„Neniu intencas konstrui muron“
Antaŭ 50 jaroj estis konstruita la Berlina Muro

Ĉi tiun artikolon pri la konstruo de la Berlina Muro antaŭ 50 jaroj interesataj Esperanto-gazetoj povas libere transpreni kaj publikigi.

Walter Ulbricht, la tiama gvidanto de ŝtato, partio kaj armeo de GDR, diris la 15an de junio 1961 en Orient-Berlino dum gazetara konferenco responde al ĉi-koncerna demando de ĵurnalisto jenajn legendiĝintajn frazojn: *„Mi komprenas vian demandon tiel: Ke en okcidenta Germanio ekzistas homoj, kiuj deziras, ke ni mobilizu la konstruistojn en la ĉefurbo de GDR por starigi muron, jes? Eh, al mi ne estas konate, ke tia intenco ekzistas, ĉar la konstruistoj en la ĉefurbo okupiĝas ĉefe pri konstruado de domoj kaj ilia laborforto estas plene engaĝita. Neniu havas la intencon starigi muron“.*

Ĉio do komenciĝis kun mensogo, trompo, perfido. En la nokto de la 12a al la 13a de aŭgusto 1961 la sama Ulbricht ordonis fermi la sektoran limon en Berlino. Kun la beno de la moskvaj estroj (Ĥruŝĉov) kaj la aktiva prepara kunlaboro de la sovetia armeo en GDR estis ŝtopita hermetike la plej lasta truo, tra kiu la GDR-civitanoj povis ankoraŭ eskapi la pli kaj pli teruran diktaturon kaj ekonomian mizeron en la sovetia zono de Germanio.

Politike, la plano establi demokratian (= socialisman?) senarmean, kontraŭfaŝisman kaj unuecan Germanion laŭ la imagoj de Stalin post la milito fiaskis, fakte plej malfrue en 1949, kiam neeviteble estis fonditaj du apartaj germanaj ŝtatoj – FRG kaj GDR.[1]

Fermita limo tra Germanio ekde 1952

Fakte la limo inter la Sovetia Zono (t.n. Germana Demokratia Respubliko) kaj la okcidentaj sektoroj (FRG) estis fermita jam en 1952. Nur la limoj inter la kvar sektoroj de Berlino estis malfermitaj. Ŝajnas ke en tiu jaro en la sovetia ministerio pri eksterlandaj aferoj estis faritaj unuaj konsideroj fermi la berlinan sektoran limon escepte de kelkaj strikte kontrolitaj transiraj punktoj, sed la momento por tio tiam evidentiĝis maloportuna. El la vidpunkto de la Oriento Okcident-Berlino signifis ĝenan truon meze en la Sovetia Zono, kiun la homoj eluzis por forfuĝi. La oftaj amasaj fuĝoj kaj la ribelo de la laboristoj en Orient-Berlino kaj GDR de la 17a de junio 1953 profunde ŝokis la politikistojn de la Orienta Bloko. Necesis bremsi tiun evoluon, kiu serioze minacis la ekziston de GDR. Depost 1953 SED klopodis malhelpi la kontaktojn de la berlinanoj inter la sovetia kaj la aliaj sektoroj. Kvankam li longe hezitis konsenti pri la fermo de la orientberlina limo, al kio daŭre premis lin Ulbricht, Ĥruŝĉov ludis la ŝlosilan rolon en la ‘solvo’ de la ‘Berlina demando’, kiel montras lastatempe esploritaj dokumentoj el la partia arkivo en Moskvo. Ĥruŝĉov, kiu ŝatis blufi kaj montri siajn muskolojn al la homaro, celis ŝanĝi la politikan kaj militan ekvilibron laŭ siaj gusto kaj favoro. La momento taŭgis por tio. En aprilo 1961 la usona invado en Kubo fiaskis. Ĥruŝĉov ruze kaj fie eluzis la politikajn kaj personajn malfortecojn de la nova usona prezidento, kiu estis Kennedy, kaj lanĉis kelkajn sensaciajn agadojn sur milita kaj kosmofluga (Gagarin) terenoj por impresi la usonanojn. Kompreninte ke ‘Berlino’ estas atuto en la riska kaj danĝera

[1] Stalin en principo ne celis la ekziston de aparta orientgermana ŝtato, ĉar li revis pri unueca komuna Germanio kun la intenco influi ankaŭ ĝian okcidentan parton. Precipe interesis lin la resursoj de la Ruhr-regiono. Sed la okcidentaj potencoj ne deziris influon de la sovetianoj en okcidento kaj fajfis pri orienta Germanio, kiun ili konsideris perdita favore al la sovetianoj. Tio kondukis en 1949 al la fondo de du apartaj germanaj ŝtatoj. Al Stalin restis la sola opcio beni la fondon de GDR kaj akcepti la fondon de FRG.

politika ludo de la grandpotencoj, precipe de Sovetunio, la senskrupula, iom sovaĝa kremlestro klopodis konvinki sian rivalon en Vaŝingtono, ke Usono fakte ne bezonas Okcident-Berlinon kaj regalis lin per militaj minacoj. Jam en novembro 1958 la sovetia gvidanto sokis la okcidentajn potencojn per sia ultimato. Sed la okcidentaj potencoj rifuzis la proponon transformi Okcident-Berlinon al senarmea 'Libera Urbo' sen rajto de ajna ŝtato enmiksiĝi. La ultimato entenis ankaŭ la minacon, ke GDR plene transprenos la kontrolon pri Orient-Berlino. En majo 1961 Okcident-Berlino estis submetita al la kontrolo de NATO.

.

Amasa fuĝado el la Oriento

Centmiloj da GDR-anoj forlasis sian landon por fuĝi al la Okcidento kaj serĉi sian feliĉon en politike pli libera kaj ekonomie pli prospera mondoparto. Inter 1949 kaj 1961 fakte 2,7 milionoj da homoj turnis la dorson al GDR. La GDR-ekonomio riskis plene kolapsi. Kiam Willy Brandt, ĉefurbestro de Okcident-Berlino inter 1957 kaj 1966, estis demandita de lia orienta kolego Friedrich Ebert, ĉu li pretas helpi solvi la problemon de la rifuĝintoj, Brandt esprimis sin malinteresata kun la argumento, ke la GDR-instancoj mem solvu tiun problemon.[2]

Kiel la Oriento solvis la problemon: La operacio 'Rozo'

Kiel oni bone scias hodiaŭ, en la menso de la GDR-politikistoj la opcio, kiu nomiĝis 'Berlina Muro', fakte ekzistis jam delonge, kaj ĝia starigo estis nur demando de la tempo. La Okcidento jam atendis tiun paŝon de la Oriento, sed la momento de ĝia realigo ne estis konata kaj venis surprize. La decidon por la fermo de la orientberlina sektoro la politburoo de SED fakte prenis la 7an de aŭgusto 1961, post pinta konferenco de la Varsovia Pakto kelkajn tagojn antaŭe, ĝian efektivigon oni planis por la nokto de la 12a al la 13a de aŭgusto. La plano estis absolute sekreta. Markus Wolf, la iama ĉefo de la eksterlanda spionado de GDR, kiu ankoraŭ dumvive fariĝis legendo, asertis en siaj romaneskaj libroj, ke la konkreta plano de la konstruado de la Berlina Muro estis konservita kiel severa ŝtata sekreto inter la ĉefkonstruistoj Ulbricht, Honecker kaj Mielke, tiel ke eĉ li, la grava Stasi-generalo, ŝajne ne estis informita pri ĝi. De la sovetia flanko la entreprenon 'aŭspiciis' Ivan Konev, ĉefkomandanto de la Grupo de la Sovetia Armeo en Germanio, la sendito de Ĥruŝĉov al Orient-Berlino, dum kolonelo Anatolij Mereŝko, vicĉefo de tiu Grupo, havis la taskon kolekti kaj administri ĉiujn informojn pri la entrepreno. Jam en julio marŝalo Andrej Greĉko, ĉefkomandanto de la Varsovio Pakto, altigis la alarmstatuson de la Nacia Popolarmeo de GDR kaj sendis tankojn al Orient-Germanio.

Do, ĉi-foje ne temis pri blufo de la sovetianoj.

La 13an de aŭgusto 1961 la GDR-radio disaŭdigis jenan novaĵon: „Hodiaŭ frue ĉe la limoj de GDR inkluzive la limojn de la okcidentaj sektoroj de Grandberlino estis enkondukita tia kontrolo kia ĝi estas kutima ĉe la limo de ĉiu suverena ŝtato." Tio signifas, ke la kontrakto, kiu validis inter la kvar potencoj pri libera trafiko en Berlino, kaj per tio la internacia juro estis klare rompita flanke de la Oriento. La Berlina Muro ne estis konstruita, ĉar GDR devis esti protektita de la "putra klasmalamiko" kaj de la "militagresema, imperiisma Okcidentgermanio", sed por haltigi la amasan elmigradon de GDR-civitanoj kaj por eviti la kolapson de la GDR-ekonomio, kaj entute la erozion de la Orienta Bloko.

[2] En 1981 la GDR-propagando asertis, ke FRG intencis en somero 1961 invadon ĉe la Brandeburga Pordego kun la celo likvidi GDRn aŭ aneksi ĝin.

Do, anstataŭ konstrui domojn, la "laboristoj" de Ulbricht estis senditaj al la sektora limo por partopreni la operacion 'Rozo': 10'000 anoj de armeo, 15'000 policistoj, 12'000 membroj de batalgrupoj kaj kunlaborantoj de la Ŝtata sekureco (Stasi) komencis "sekurigi" la urbon ĉirkaŭ la 43 kilometrojn longa intersektora limo kun okcidenta Berlino kaj la 112 kilometrojn longa limo kun la GDR-distrikto Potsdam. Je la sesa horo matene la verko estis perfekta kaj la limo hermetike barita kaj ŝtopita. La nova limo, fortikigita per barikadoj kaj konsistanta el dorndrato (150 tunoj) kaj betonŝtonoj (18'200) fermis 192 stratojn, 32 fervojajn liniojn, 8 S-liniojn kaj 4 U-liniojn kaj plurajn stacidomojn, 3 aŭtoŝoseoj estis interrompitaj. De la 81 limkontrolejoj 69 estis fermitaj tuj kaj du aliaj en la sekvaj tagoj. La dormantaj kaj nenionsciaj enloĝantoj de Okcident-Berlino, al kiu estis malpermesite iri al Orient-Berlino[3], estis tute surprizitaj kaj senhelpaj, kiam ili matene retrovis sin enfermitaj de barila sistemo, la mondo perpleksa. Dekmiloj da ŝokitaj homoj kolektiĝis ĉe la muro por 'admiri' ĝin, plori, krii sian proteston kaj mansvingi. Kaptitaj limgardistoj estis batitaj de la furioza amaso, kaj kontraŭ ili eĉ ŝtonoj estis ĵetitaj. Okazis plej lastaj provoj fuĝi, ĉu tra la limbarilaro, ĉu tra domfenestroj. Ĝis la mezo de septembro pli ol 600 personoj sukcesis fuĝi, parte per sensaciaj provoj. En la memoro vigle restas la sukcesa salto de la juna policisto Conrad Schumann de la 15a de aŭgusto ĉe la Bernaŭa Strato. Bedaŭrinde multe malpli sukcesa estis la salto de Ida Siekmann, kiu la 22an de aŭgusto saltis el la tria etaĝo de sia domo ĉe la Bernaŭa Strato. Ŝi pereis. Ankaŭ alia orientberlina fuĝanto, Günter Litfin, malbonŝancis: Dum sia provo fuĝi al Okcident-Berlino la 24an de aŭgusto li estis mortpafita de la orientgermana transportpolico en la baseno de la Humboldt-haveno antaŭ ol preskaŭ esti atinginta la okcidentan bordon. Tiel li fariĝis la unua pafviktimo de la limo.[4] Ĉe la Brandenburga Pordego la GDR-polico respondis per bomboj kun larmiga gaso, kiu pro la okcidenta vento tamen estis reblovita al Orient-Berlino. La okcidentberlina polico forpelis la daŭre ĉeestantan homamason de la sektora limo per akvoĵetiloj. Ĝis la aŭgusta fino en Orient-Berlino estis arestitaj 2192 personojn, kiuj protestis kontraŭ la konstruado de la Berlina Muro, 691 personoj estis malliberigitaj kaj arestitaj en karcero por iom pli longa tempo.[5] Inter ili troviĝis kompletaj familioj kaj kelkaj limgardistoj. Precipe en 1962/63 okazis multaj provoj konstrui tunelojn sub la limo kun la celo fuĝi al Okcident-Berlino. Dum kelkaj homoj sukcesis fuĝi, aliaj, kiuj estis kaptitaj, pagis altan prezon, kelkfoje eĉ per sia propra vivo.

Politikistoj restas trankvilaj

La okcidentaj aliancitoj ja protestis por plenumi sian formalan devon, sed krom movi kelkajn tankojn ili entreprenis nenion signifan. Fine de julio William Fulbright, prezidanto de la komisio pri ekstera politiko de la usona senato diris en intervjuo, la fermon de la limoj Usono ne konsideras rompo de la kontrakto. Kennedy ne kontraŭdiris ĉi tiun vidpunkton. Kiam Kennedy, Macmillan kaj Adenauer estis informitaj pri la fermo de la orienta sektoro, ili konservis trankvilon, ricevinte la certecon, ke la operacio de la GDR-anoj ne tuŝas la interesojn de la aliancanoj en la okcidentaj sektoroj de Berlino.[6] Kennedy diris: „Prefere estu

[3] Nur en decembro 1963 estis alprenita interkonsento, laŭ kiu parencoj povis viziti la orientan urboparton.

[4] Internacie fama kazo fariĝis la mortigo de Peter Fechter la 17an de aŭgusto 1962, kiu provis fuĝi al Okcident-Berlino. Ĉi tiu kazo estis aparta tragika, ĉar post la pafado neniu helpis al li, tiel ke post 50 minutoj li pereis. Fechter fariĝis la tutmonda simbolo de la senhelpeco vidalvide de la dispartigo de la urbo.

[5] Kiel fifamaj prizonoj, en kiuj GDR-rifuĝintoj kaj politikaj viktimoj estis ĵetitaj kaj fitraktitaj de Stasio, menciindas ĉefe Höhenschönhausen en Berlino, Brandenburg-Görden kaj Bautzen II, sed ankaŭ malpli konataj kiel 'Lindenhotel' en Potsdam, 'Ruĝa Okso' en Halle, krome la malliberejoj de Hoheneck, Schwedt, Bützow, Waldheim, Hohenleuben, Torgau kaj Zwickau.

[6] Temis pr la tri 'essentials', kiujn Usono kaj NATO difinis rilate al Okcident-Berlino: 1. Garantio de la libereco de la okcident-berlina loĝantaro elekti sian propran politikan sistemon; 2. Ĉeesto de okcidentaj aliancitaj

muro anstataŭ milito“. Formale la okcidentaj aliancantoj protestis la 16an de augusto en Moskvo, ke la fermo de la sektora limo signifas rompon de la Berlin-kontrakto. Adenauer vizitis Berlinon nur la 22an de aŭgusto, Kennedy veturis tien eĉ nur du jarojn poste por certigi sian solidarecon kun la berlinanoj

En la sekvaj semajnoj la Berlina Muro, kiu en la ĵargono de GDR estis nomita “ŝtatlimo de GDR“ aŭ “kontraŭfaŝisma protekta remparo“, ricevis pluan fortikadon, en la postaj jaroj la limo fariĝis eĉ pli kaj pli maltransparenta, pli monstra kaj mort-danĝera, nelaste ĉar ĝiaj gardistoj estis ekipitaj per la fifama paf-ordono, kiun la GDR-limdefendistoj rajtis – fakte devis – apliki kontraŭ fuĝantoj – precipe el la propra lando.[7]

En oktobro 1961 la situacio ĉirkaŭ la Berlina Muro akriĝis. De la usona flanko, Lucius D. Clay, armea guberniestro en la usona zono de Berlino, ŝatis provoki la Orienton pere de sensaciaj elpaŝoj: Li sendis usonajn tankojn al Checkpoint Charlie kaj mem publikefike transpaŝis la interzonan limon. En orienta Eŭropo, kaj ne nur tie, multaj homoj kredis, ke la Tria Mondmilito kun apliko de nukleaj armiloj baldaŭ eksplodos.

Germanoj malantaŭ la ‘Fera Kurteno’

La Berlina Muro, kiu disdividis la homojn, precipe la germanojn oriente kaj okcidente, cementis por la venontaj tri jardekoj la dispartigon de Germanio kaj de Eŭropo laŭ blokoj liberalisma kaj komunisma (fakte stalinisma). Ĝi fariĝis tutmonda simbolo de la ‘Malvarma Milito’ kaj impresa monumento de la komenco de la bankroto de fiaskinta politika sistemo, kiu klopodis savi sian ekziston enfermante la propran popolon kvazaŭ en malliberejo.

Per sia muro la gvidaj komunistoj de GDR atingis siajn celojn laŭ propraj imagoj pri la konstruado de la socialismo en enfermita lando. Krom Kennedy ankaŭ iuj aliaj eĉ asertis kaj komencis kredi, ke la muro helpis eviti novan militon, pro kio la muro ricevis de GDR ankaŭ la nomon “limo de la paco“. Malgranda konsolo. Sekve, la tuta GDR-propagando ĉirkaŭ la muro tordiĝis en tiu senco, ligita kun la akuzo kontraŭ la Okcidento, ke ĝi havas militismajn strebadojn. Nun la konkurado inter la du diversaj politikaj, ekonomiaj kaj sociaj sistemoj akriĝis, la rivaleco kaj malamikeco inter ambaŭ germanaj ŝtatoj, inter la Okcidento kaj Oriento profundiĝis, la tensioj streĉiĝis. La germanoj en la Oriento malaperis malantaŭ la ‚Fera Kurteno’, kiel oni nomis la muron en la Okcidento, kaj por la germanoj en ambaŭ partoj fariĝis malfacile viziti unu la aliajn. Kun iuj esceptoj, averaĝaj GDR-anoj praktike ne plu rajtis veturi eksterlanden, nur komplikaj intertraktoj inter GDR kaj FRG tamen iom faciligis la rilatojn. Precipe parencoj je ambaŭ flankoj de la german-germana limo suferis sub tiu neeltenebla situacio, dum politikistoj kaj spionoj de ambaŭ Germanioj – kiel Markus Wolf kaj ties ‚kunlaborantoj’ – povis sufiĉe libere cirkuladi inter la du landopartoj.

Tiel, la ĉefa monumento de la Malvarma Milito, la Berlina Muro, ricevis sian konkretan vizaĝon. Ĝin ĝi konservis 28 longajn jarojn ĝis la falo, fakte faligo, de la muro la 9an de novembro 1989, kiu iom poste forbalais ankaŭ senkompate la fiaskintan eksperimenton de „unua socialisma ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj sur germana tero” – , por pretigi la vojon al la longe sopirata reunuiĝo de Germanio. Ankoraŭ en januaro 1989

---

armeanoj tiom longe ke ili estas necesaj kaj deziratj de la loĝantaro de Okcident-Berlino; 3. Garantio de la ebleco atingi Okcident-Berlinon per la aŭtoŝoseo, kiu iras tra GDR-teritorio, sed ankaŭ en la aero kaj sur la akvo. La ebleco libere moviĝi inter la urbaj sektoroj ne konsistigis la postularon. Tiel, la status quo de Okcident-Berlino estis senkompromise defendita.

[7] En la 80aj jaroj ekzistis la plano instali t.n. ‚High-tech-muron’ kun elektronika sistemo, kiu devintus registri fuĝantojn jam longe antaŭ la limzono mem.

Honecker promesis, ke la muro restos 50, 100 jarojn, nome tiom longe ke ekzistas la "kialoj de ĝia ekzisto".

La Berlina Muro estis tre rapide detruita, ĉar la berlinanoj volis rapide malaperigi ĝin el sia urbo. Nature, la Berlina Muro kaj la cetera GDR-limo estis grava allogaĵo por turistoj, kiuj amase venis admiri ĝin de la okcidenta flanko, kaj iuj eĉ bedaŭras ĝian malaperon, en la Oriento cetere tamen pro aliaj kaŭzoj. 20 jarojn poste en multaj lokoj estas eĉ tre malfacile retrovi la strion, kie la Berlina Muro iam staris.

La viktimoj de la Berlina Muro

Parolante pri la Berlina Muro, oni ne povas ne paroli pri la multaj viktimoj, kiujn ĝi kostis, oficiale minimume 136 mortintojn.[8] Pri la ekzakta nombro da viktimoj ĝis nun ne ekzistas certigitaj indikoj, unue ĉar la nombro de mortkazoj ĉe la limo estis ŝtata sekreto de GDR kaj pro tio sisteme prisilentita aŭ nebuligita fare de la GDR-instancoj. Due ĉar ekzistas disputo pri la kriterio kio estas viktimo kaj kiu estas konsiderata kiel viktimo, sub kiaj cirkonstancoj homoj fariĝis viktimoj (krom la 'klasikaj' viktimoj, kiuj estis intence kaj konscie mortigitaj aŭ kiuj pereis dum provo fuĝi, ĉar ili estis trafitaj de kuglo aŭ eksplodaĵo, ekzistis ankaŭ personoj, kiuj pereis ĉe la limo pro aliaj kaŭzoj. Cetere, ankaŭ GDR-soldatoj pereis ĉe la limo, perforte aŭ en akcidento[9]). Inter diversaj laborgrupoj, kiuj post la fino de GDR komencis esplori la kazojn, regas malkonsento, depende de la kriterioj aplikitaj por difini la viktimojn. Pri ĉi tiu tragika temo ekzistas multaj informoj kaj raportoj en la faka literaturo kaj en interreto. Sed la formalan diskuton de burokratoj kaj 'sciencistoj' pri viktimeco oni povas konsideri kiel cinika. Eĉ pli cinika tamen estas la fakto, ke la viktimoj de la GDR-limo estis primokitaj kaj denuncitaj de la GDR-instancoj kiel perfiduloj kaj krimuloj, iliaj parencoj observitaj, ĉikanitaj kaj persekutitaj. La 13an de aŭgusto je la 12a horo Germanio memoris ilin en silenta minuto.

Multaj berlinanoj aprobas la konstruon de la Berlina Muro antaŭ 50 jaroj

Laŭ aktuala enketo de Forsa, publikigita en Berliner Zeitung, pli ol unu triono de la berlinanoj pritaksis la konstruon de la muro en 1961 kiel tute aŭ parte ĝusta. Laŭ tiu enketo dek procentoj de la berlinanoj aprobis la disdividon de la urbo "plene kaj tute", pliaj 25 procentoj "parte". Tamen, 62 procentoj "tute ne" aprobis tiun ĉi sintenon.

Aparte populara la aprobo de la konstruo de la muro ŝajnas esti inter iamaj orient-berlinanoj: nur 41 malaprobis ĝin. Inverse, 69 procentoj de la iamaj okcident-berlinanoj rifuzis la starigon de la muro, same 75 procentoj de homoj, kiuj alvenis al Berlino post 1990. Konkrete la demando de le enketo estis jena: „Ĉu vi opinias, ke la konstruo de la Berlina Muro el tiama vidpunkto estis necesa kaj rajtigita por haltigi la foriron de fakaj laborfortoj el GDR kaj por stabiligi la politikan situacion en GDR kaj en Germanio entute?" Plej forte tiun frazon aprobis la membroj de la 'Maldekstra Partio', konsistigata el la iama PDS, pli frue SED. 28 procentoj el ili plene aprobis ĝin, 46 procentoj aprobis ĝin parte.

[8] Laŭ la kalkulo de la laborgrupo '13a de aŭgusto' ĝis 1989 pereis 254 personoj ĉe la Berlina Muro. La plej lasta viktimo estis C. Gueffroy (6.2.1989).

[9] Propagandocele misuzita de GDR estis la tragika morto de Rudi Arnstadt, kapitano de la GDR-limgardistoj, kiu pereis la 14an de aŭgusto 1962 ĉe la german-germana limo pro pafo flanke de la okcidentgermana limgardisto Hans Plüschke. (vd. http://de.wikipedia.org/wiki/Todesfälle_unter_DDR-Grenzern). La kadavron de Plüschke, kiu cetere timis venĝon, oni trovis en 1998 kun pafo ĉe la sama loko kiel en la kazo de Arnstadt.

Ekster la aktuala polemiko ĉirkaŭ la Maldekstra Partio pluraj germanaj politikistoj postulis, ke la historio de la Berlina Muro kaj de GDR estu pli serioze traktata en la lernejoj, por ne forgesi la historion kaj ne fariĝi indiferenta pri la viktimoj de la pasinteco. Tiucele estus bone, se la paroladoj de Christian Wulff kaj Klaus Wowereit, kiujn ili prezentis la 13an de aŭgusto 2011 en Berlino, estus tradukitaj al Esperanto kaj publikigitaj en la Esperanto-gazetaro.

Esperanto-movado kaj la Berlina Muro

Pri la deviga aprobo de la GDR-politiko fare de la oficiala Esperanto-movado de GDR ni ne devas perdi multajn dirojn. Ĉio estas bone dokumentita en la koncerna gazetaro kiel *der esperantist* kaj *Paco.* Sed ĉu la Esperanto-gazetaro, ekzemple tiu de GDR, skribis pri la Berlina Muro? Certe oni evitis trakti ĉi tiun tiklan temon. Sed vi ne kredos min – mi povas konfirmi, ke jes oni skribis pri ĝi, sed laŭ sufiĉe bizara maniero. En la informilo *der esperantist* (n-ro 11-12/1966) estis publikigitaj el la bulteno de flandra Federacio de laboristaj esperantistoj *Nia espero* (n-ro 6-7/66) jenaj linioj el la kurioza raporto:

„Grupo de belgaj liberpensuloj (sic) entreprenis la 30an de aprilo 1966 aŭtobusan vojaĝon de Antverpeno, por viziti dum kelkaj tagoj la Germanan Demokratian Respublikon. (...) Dum la posttagmezo (de la 1a de majo) ni vizitis kelkajn Berlinajn vidindaĵojn, i.a la Brandenburgan Arkaĵon, la faman Berlinan "muron". Fakte ĉe tiu loko ne troviĝas muro, nur ordinara bariero. Ŝajnas ke aliloke, kie estas pli malfacile gardi, oni efektive konstruis ŝtonan muron por marki la komenciĝon de alia ŝtato. (...) Kiu iomete konas la situacion ne kontestos, ke la Germana Demokratia Respubliko ne ĝuas la feliĉon disponi pri pacema najbaro. Ke tiu najbaro parolas la saman lingvon, ne multe ŝanĝas al tio. (...)"Ia komento superfluas. Ĉar mankis klarigoj pri la cirkonstancoj kaj veraj kaŭzoj de la apero de la Berlina Muro, tiu ĉi raporto ne povas esti serioze konsiderata. Partoprenante la plumpan retorikon de la Orienta Bloko kaj misuzante por la propra propagando eĉ iun faman libron de Karl Jaspers, kiu lanĉis kritikon kontraŭ iuj aspektoj de la politiko de okcidenta Germanio, *der esperantist* klare subtenis en tiu tempo la embarasan misfamigan kampanjon de GDR kontraŭ Federacia Respubliko Germanio, kiu estis karakterizita de la GDR-propagando kiel "aŭtoritatisma, agresema ŝtata kreaĵo, kiu en si portas la danĝeron de la totala faŝismiĝo kaj de la milito".[10]

Kvankam estas konate, ke en la postmilita okcidenta Germanio multaj ankoraŭ vivantaj funkciuloj el la nazia tempo retrovis laborlokon kaj honoran oficon en la publika vivo de FRG, la histeria bruo de GDR kontraŭ FRG kiel militagresema lando estis klare troigita kaj nepravigita – ankaŭ en FRG neniu serioze konsiderata politika forto deziris novan militon. Sed oni ankaŭ ne deziris la komunismon en Eŭropo kaj do komencis, aŭ daŭrigis, retorike kaj alimaniere kontraŭbatali ĝin, cetere tute prave. Malgraŭ ŝajne blufa retoriko de la Orienta Bloko, en la Okcidento la veraj agresaj intencoj de Sovetunio estis malfacile pritakseblaj (dum ĝia milita potencialo ja estis pli malpli konata). Pro tio la Okcidento devis instali iujn preventajn kaj defendajn rimedojn, al kiuj certe ne mankis propagandaj celoj. En la cirkonstanco, ke ambaŭ blokoj kulpigis unu la alian pro militemo kaj imperiismo kaj daŭre aktualigis siajn armeajn ampleksojn, konsistis la absurdeco (kaj 'ekvilibro') de la Malvarma

[10] En tiu tempo *der esperantist,* kiu komencis aperi en 1965 post kiam la malpermeso de Esperanto en GDR estis nuligita, estis redaktita de teamo ĉirkaŭ Eugen Menger, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Emil Rechtziegler, Erwin Schleusener, Willi Vildebrand, Otto Bässler. (Detlev Blanke, kiu estis sekretario de la Centra Laborrondo Esperanto en la Germana Kulturligo, aldoniĝis al la redakcio nur en 1969; en 1970 li transprenis la respondecan redaktadon de *der esperantist*).

Milito, kiu feliĉe finiĝis kun la falo de la Berlina Muro en 1989 kaj la Reunuiĝo de Germanio en oktobro 1990.

Certe, se oni ne aparte skribus pri ĉi tiuj kaj aliaj epizodoj, ankaŭ ili apartenas al la historio, verŝajne neniu plu rememorus aŭ volus rememori ilin, ĉar la tempoj plene ŝanĝiĝis kaj tiuj temoj ne plu estas oportunaj por esti traktitaj. Tiel bedaŭrinde ankaŭ parto de la Esperanto-gazetaro lasis sin misuzi por la politika propagando, precipe en orienta Eŭropo. La ekzemplo prezentita ĉi tie estas nur unu el multaj. La Esperanto-gazetaro de la Orienta Bloko polemikis kontraŭ la Okcidento sisteme dum jardekoj. Pri la objektivaj cirkonstancoj rilate al la konstruado de la Berlina Muro kaj pri la reala situacio en la Orienta Bloko ĝi ne raportis. Ĉar parto de la Esperanto-movado entuziasme kunludis la perversan ludon de la politika ekstremismo en la mondo por ludi sian propran gravan rolon, en la Oriento devige, en la Okcidento libervole, tial estu permesate almenaŭ starigi la demandon ĝis kiu grado la Esperanto-movado ŝajnas esti politike diskreditita. Por aserti tion necesus novaj ampleksaj studoj kaj pruvoj.[11]

Andreas Künzli
www.osteuropa.ch
13-8-2011

Konsultindaj fontoj (en la gemana lingvo)
www.50jahremauerbau.de, www.geheimsache-mauer.de, www.osteuropa.ch
www.berliner-mauer-gedenkstaette.de/de/todesopfer-240.html
www.bundespraesident.de, www.berlin.de
Hans-Hermann Hertle: Die Berliner Mauer. Biographie eines Bauwerks.
Edgar Wolfrum: Die Mauer. Geschichte einer Teilung.
Hope M. Harrison: Ulbrichts Mauer. Wie die SED Moskaus Widerstand gegen den Mauerbau brach.
Frederick Kempe: Berlin 1961. Kennedy, Chruschtschow und der gefährlichste Ort der Welt.
Michael Behnen (Hg.): Lexikon de deutschen Geschichte 1945-1990.
Wilfried Loth: Stalins ungeliebtes Kind. Warum Moskau die DDR nicht wollte.
Markus Wolf: In eigenem Auftrag: Bekenntnisse und Einsichten.
Hans-Dieter Schütt: Markus Wolf. Letzte Gespräche.
Geheimakte Mauerbau, ZDF-History, Ausgabe vom August 2011.
Politischer Brief des Chefs der Schweizerischen Delegation in West-Berlin an den Chef der Abteilung für politische Angelegenheiten des Eidg. Politischen Departements vom 16.8.1961.

Pliajn informojn pri la fakliteraturo (en la germana lingvo) pri la temo volonte donas la aŭtoro.

Ĉi tiun artikolon pri la konstruo de la Berlina Muro antaŭ 50 jaroj interesataj Esperanto-gazetoj povas libere transpreni kaj publikigi.

[11] Detala analizo de la politika enhavo de *der esperantist* estas nun farata kaj sekvos kiel publikaĵo en interreto. *Internacia lingvo, Informbulteno de ASE, Pola esperantisto* kaj *Bulgara esperantisto* estas analizataj kadre de disertacio pri la historio de Esperanto en Sovetunio, Pollando kaj Bulgario.

Andreas Künzli (*1962) studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika Universitato (Svislando), 1983-1992, kun studrestadoj en Sovetunio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario. Verkis diplomlaboraĵojn pri historio de Sovetunio kaj Baltaj Ŝtatoj kaj pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando. Verkis krom multnombraj artikoloj svisan enciklopedion kaj germanlingvan biografion pri L.L. Zamenhof (eldonejo Harrassowitz). Verkas nuntempe disertacion pri la historio de la Esperanto-movado en Ruslando/Sovetunio, Pollando kaj Bulgario. Lia dua profesia okupo estas informadikisto (interreto).